

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL  
BARCELONA-HISPANUJO

**AVIZO:** La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

**ENHAVO:** 21<sup>a</sup> Julio. — Unua Kongreso de Katolikaj Esperantistoj. — Studkomisiono pri ĉiulanda verkaro. — La Patrujo. — Revo. — Rakonto. — Enlanda Movado. — «Internacia Asocio de Instruistoj». — Korespondado.

21<sup>a</sup> JULIO

**A**NTAŭ unue aparte ni kunhelpis starigi la monumenton al Amo al la Homaro. Private kaj ĉien ni klopodis por ke ni ne estus estintaj solaj en tia kunhelpado. Hodiaŭ kiam ni atingis nian plenaĝon, kaj nia forto estas pli granda, hodiaŭ kiam ni atingis vastan rondon kaj riprezentadon de multaj esperantistoj, ni festas tute ĝoje la datrevenon de la 21<sup>an</sup> Julion. En tia dato ni vidas stimulon por antaŭeniri ĉiujare, kun espero atingi la plenan triumfon, kaj la 21<sup>a</sup> de Julio estos la dato kiun la homaro gravuris sur la piedestalo de la monumento al Frateco; kiun Zamenhof, la majstro, ekstarigis sur la mondo, per la aperigo de la unua libro pri Esperanto.

Kaj tiu monumento kiu estos vere starigita de la esperantistaro, kiel triunfo de Frateco, de Amo, estos samtempe la monumento kiun la homaro dediĉas al elpensinto de nia kara internacia lingvo; monumento kiu daŭros eterna, ĉar ĝi estas starigita en la koro de ĉiuj, kaj estos ankaŭ en la koro de ĉiuj postvenontaj homoj.

LA REDAKCIO





KELKAJ DIVERSLINGVAJ KONGRESANOJ, INTER ILI KVAR KATALUNOJ

## UNUA KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

Tiu ĉi kongreso okazis en Parizo dum la lasta Aprilo. Ĝi estis elokventa montrado de la disvastigado de Esperanto ĉe la katolikoj, kaj konsekvence denove estis pruvita ke la Eklezio, ne rifuzas novajn sukcesojn, progresojn de la scienco, sed kontraŭe ĝi estas preta partopreni en ĉiuj veraj kaj sciencaj movadoj.

Tiu ĉi kongreso esceptinte la oficialajn Internaciajn Kongresojn estis la unua Internacia Kongreso kunvenita.

Ĝia celo estis servi samtempe al la katolikismo kaj al Esperanto. Pro tio, raportoj estis prezentitaj al la Kongreso, je ĉi tiuj du vidpunktoj.

«La unueco de la kristanoj; la unuforma elparolado de la latina lingvo, la kulta organizado; la katolika socialagado; propagandoj kaj informoj katolikaj per la peroj de Esperanto; la katolika protektado per internacia esperantista ligo» jen raportoj pristuditaj kaj diskutitaj en la grandaj salonoj de l'«Institut Catholique» kie okazis la kunvenoj. Ĉiuj raportadoj estis tre interesaj, tre gravaj, tre praktikaj, sed oni devas rimarki kiel la plej praktikan kaj efikan, la lastan ri-

late al la katolika esperantista ligo. Ĝi estis kordezirita de multjar-oj de multaj katolikoj! Nun ĝi estas jam efektiviĝinta!

Restas starigita Katolika Unuiĝo. Esperantista Internacia, kies celo estas disvastigi Esperanton ĉe la katolikoj kaj servi al la Katolikismo per Esperanto. Ĝi konsistas el Internacia estraro kies sidejo estos Parizo, kaj kies organo estos fame-konata revuo *Espero Katolika*. Ĝi konsistas ankaŭ el estraroj regionaj, aŭtonomaj en ĉiuj landoj kie estos almenaŭ 20 esperantistoj aliĝintaj al la K. U. E. S.; tiuj estraroj klopodos por disvastigi Esperanton en siaj landoj kaj nomos membrojn de la ĝenerala straro proporcie al la numero de siaj anoj. En nia lando estas ĵus ekkreata kataluna ligo. Por demandoj, informoj kaj aliĝoj sin turnu ĉe la «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj» (Porta-ferriça, 13, principal, Barcelona).

Utileco de nia kara Zamenhofa lingvo estis pruvita en la ekskursoj de la Kongresanoj al *Versailles, Trianon, Vincennes, Montmarvre* k. t. p. kie kongresanoj esperante aŭdis informojn pri la interesaj aferoj tie loĝantaj.

Dum la kongreso anoj festis kunvenojn katolikajn kun kantoj kaj predikoj esperante.

Ankaŭ okazis frata manĝo en la granda *Palais d'Orleans*, en kiu inter multaj proponoj estis akceptata jenan; okazi la duan kongreson en Hago (Nederlando) en la venonta jaro dum la septembra monato.

Kongresanoj ĉeestantoj estis 700, el 14 nacioj. Nia Katalunlando alportis 60 aliĝojn el kiuj ĉeestis 7 samdanlandoj kiel reprezentantoj. Inter la katalunaj aliĝoj oni devas rimarki aliĝon de Lia moŝto arkiepiskopo de Tarragona, Lia moŝto episkopo de Barcelono, kaj diversaj societoj inter kiuj «Espero Kataluna», «Espero Priorata», «Joventut Catòlica» (Barcelona); «Esperanta Akvofalo» (Ripollet); «Acción Social Popular» (Barcelona); «Esperanta Nesto» (Barbará); «Joventut Catòlica» (Sabadell) kaj aliaj.

Nia kara majstro Dro. Zamenhoff sendis tre entuziasman leteron al la kongreso dankante katolikojn pro ilia partoprenado en la granda kaj belega esperanta movado.

Nia *unua* sukcesis kaj ni esperas ke ankaŭ sukcesos sia ido «Katolika Unuigo Esperanta Internacia».

DRO. JOAKIMO COLL

Sant Feliu de Codines.



## STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sekvo) <sup>1</sup>

### KATALUNUJO

#### ANONIMO

Sab. — Mi tiam estus dirinta al la juĝantaro, al tiuj ĉi ŝveliĝaj anonimoj. (70)

Orig. — *Jo li hauria dit an el jurat, an aquests inflats anonims.* (Manko de rilato inter, *aquests* kaj *jurat*.)

Rap. — Mi estus dirinta al la juĝantoj, al tiuj malplenaj anonimuloj.

#### ANTAŬ MULTE DA JAROJ

Sab. — Antaŭ multe da jaroj, mi enmetas en la fornon ŝtipojn... Kaj nun mi laciĝus? (123)

Orig. — *Fa una restallera d'anys que n'hi poso de llenya al forn; i ara'm vindria'l cansar-me?*

Rap. — Jam de post amaso da jaroj mi enmetas en la fornon ŝtipojn, kaj ĝuste nun mi laciĝus?

#### APUDESTI

Sab. — Ĉu ne estas nia devo resti apud ci? Bone, apudestu la seĝon. (56)

Orig. — *No es el meu dever fer-te costat? Vaja, faci costat an el silló.*

Rap. — Ĉu ne estas mia devo akompani vin? Bone, nun akompanu la apogseĝon. (La kataluna frazo: *fer costat*, ne signifas, esti apud, nek esti flanko, sed, esti apudaĵo, esti apogilo, esti subtenanto. La ludvorto estas malbonega en la originala lingvo mem, kaj mi opinias ke nur la verbo akompani, povas iom konservi la fluecon en la dialogo.)

AVO anstataŭ MASTRO, MAJSTRO aŭ io simila.

Sab. — Sciu, avo, ke mi dezirus fali en ĝin! (6)

Orig. — *Sabeu, avi, que jo hi voldria caure a dintre!*

Rap. — Ja, mia mastro, al mi plaĉus fali en ĝin!

#### BONNOVAJO

Sab. — Ĉu vi diras bonnovaĵojn? (27)

1) Vidu la numerojn 4<sup>an</sup>

Orig. — *Una bona noticia, diu?*

Rap. — Ĉu bonan sciigon?

## DA

Sab. — Da kvardek jaroj mi jam estas almuzulo! (14)

Orig. — *Ja ja quaranta anys que jaig de pobre!*

Rap. — Jam de kvardek jaroj mi laboras kiel almuzulo!

## DES MALPLI

Sab. — Montru al mi la fingrojn. — Mi tute ne ĝin tuŝis. — Eĉ per la nazo? — Des malpli, ĉar ĝi estas tre proksime de la buŝo, kaj vi komprenas...? (11-12) (Vidu eĉ.)

Orig. — *Aveiam els dits. — No la só tocada ni gota. — Ni amb el nas? — Menos, perquè es massa aprop de la boca, i sabeu...?*

Rap. — Montru la fingrojn. — Mi ĝin tute ne tuŝis. — Nek per la nazo? — Ho, ne! Ĝi estas tro proksima de la buŝo, kaj... ĉu vi komprenas...?

## KION CI DEZIRU NOMI

Sab. — Sciu pentristo, ke el tio ĉi, kion ci nomas glori-laŭro aŭ famo, aŭ nomo, aŭ tio, kion ci deziru nomi, ci ĝin havos. (61)

Orig. — *Sapigues, pintor, que d'això que 'n dius llover, o gloria, o nom, o 'l que vulguis, en tindras.*

Rap. — Sciu, pentristo, ke tion kion vi nomas laŭro, aŭ gloro, aŭ famo, aŭ kiel vi volos (aŭ iel ajn) vi havos.

## DRINKIGI KUN LA SENCO EBRIIGI

Sab. — Mi eĉ kredas, ke multfoje ci drinkigis min per vortoj. (63)

Orig. — *Jo fins he cregut, moltes vegades, que m'has emborratxat de paraules.*

Rap. — Mi eĉ ofte (aŭ multfoje) kredis, ke vi ebriligis min per vortoj.

## DUM ANSTATAŬ TIEL-KIEL

Sab. — Sed dum la infanoj deziras rememori la vortojn mi deziris rememori la kolorojn, la liniojn kaj precipe la esprimadon. (39)

Orig. — *Però, així com les criatures volen recordar les paraules, jo volia recordar les linies, els colors, i sobre tot l'expressió.*

Rap. — Sed, kiel la infanoj klopodas (intencas, volas) rememori la vortojn, tiel mi klopodis (intencis, volis) rememori la kolorojn, la liniojn kaj precipe la elŝajnon (aŭ la korpan esprimon).

## VE EL

Sab. — Ha ve el ci! (45)

Orig. — *Ai de tu!*

Rap. — Ve, vi!

## EL

Sab. — Kiel komencis cian aldonitecon? El la infaneco. (39)

Orig. — *Com te va venir l'afició? — De criatura.* (La respondo ne rilatas la demandon.)

Rap. — De kiam datumas cia artinklino? — De lia infaneco.

## EL EKSTERE

Sab. — La metio estas tre bela, tre, vidata el ekstere. (44)

Orig. — *L'ofici es molt hermós, molt, vist per fóra.*

Rap. — La eksterajo de la metio estas tre, tre bela.

## ELĴETI EN

Sab. — Ĉiam eljetante jarojn en la fornon! (136)

Orig. — *Sempre tirant anys al forn.*

Rap. — Ĉiam (en) ĵetante jarojn en la fornon!

## EMINENTECO anstataŭ EMINENTULO

Sab. — Li revenas kvazaŭ li estus; eminenteco! (129)

Orig. — *Ens torna ŝel una «lumbreira».*

Rap. — Li revenas al ni eminentulo.

## ENTENI

Sab. — Ŝajnas, ke mia brusto disvastiĝas kaj ke ĉiuj povus enteni en ĝi! (53)

Orig. — *Sembla que'l meu pit s'aixampla i que tothom hi capiga a dintre!*

Rap. — Ŝajnas, ke mia brusto plilarĝiĝas, kaj ke ĉiuj povas enteniĝi en ĝi! (pli bone: ke ĝi povas ĉiujn enteni).

## FARI kaj stilo

Sab. — ... sed por li mi faros tion, kio mi estas devigata esti: egoista, sovaĝa, besto, kaj eĉ malbona. (99)

Orig. — ... *però per ell em tornaré lo que'm lingui de tornar: egoista, fera, i fins dolenta.* (Ĉu egoista kaj sovaĝa ne estas ja malbona?)

Rap. — ... sed por li mi fariĝos ĉio ajn: egoista, sovaĝa, kaj eĉ malbona!

#### FARI KOPII AL MI ANSTATAŬ IGI MIN KOPII

Sab. — ... la instruisto faris kopii al mi figuraĵojn... (39)

Orig. — ... *el mestre'm feia copiar estampes...*

Rap. — ... la instruisto igis min kopii bildojn...

#### FLARI ANSTATAŬ ODORI

Sab. — Ke ĉe ni flaris, kvazaŭ ĝi estus muelilo. (79)

Orig. — *Que a casa feia flaire de moli.*

Rap. — Ke nia hejmo odoris, kiel muelejo.

#### FRAPITA DE LA SUNO

Sab. — Bajlet estas frapita de la suno. (77)

Orig. — *El bailet està colrat.*

Rap. — La knabo estas (sun) brunigita.

(*Daŭrigos*)



## LA PATRUJO

**A**MU vian patrujon civitanoj; sed vi ne faru el ĝi ekskluzivan celon de via volo, de via sento, nek de via penso. Estas alia patrujo pli granda; la tero.

El la tero vivadas ĉiuj homoj, ne el la sola nacio al kiu ili apartenas. Kiel mizere kaj maloportune ni vivadus, sen la produktoj el la restanta Eŭropo, sen tiuj el Afriko, el Ameriko kaj el Azio!

La ideo, pri la aparta patrujo, estas sub multaj vidpunktoj malbonega. Ĝi ekscitas kaj subtenas la ĵaluziaĵojn kaj malpacojn inter la nacioj, provokas konfliktojn, bruligas militojn. Ĝi devigas la subtenon de grandaj militistaroj kaj armeoj, kaj la fortifikadon de la landlimoj. Ĝi kreis la doganojn kaj malebligas la liberan interŝanĝon de produktoj.

Nur la limigo de landoj apudaj, kiom da luktoj ĝi naskis! Kaj dum la nacioj estas ĉiuj pretaj kontraŭbatali sin pro colo da tero kiun oni uzurpis al ili, aŭ pri kiu ili pensas ke oni uzurpis, rigardas indiferece kiel iliaj landanoj elmigras.

Se la ideo de aparta patrujo, almenaŭ igus respektata tiun de la aliaj popoloj! Sed, en nomo kaj pro intereso de la aparta patrujo, oni konkeras la patrujon de aliaj, kaj oni igas kolonioj, insulojn kaj eĉ marbordojn de malproksimaj kontinentoj. Tie estas mia patrujo, kie estas mia standardo, diras nun la nacioj.

Kiom da sovaĝaj sentoj, vekas la ideo de malgranda patrujo!

Ne ekzistas krueleco nek barbareco, kiun la patriotismo ne naskis kaj legitimis. Estas la patrujo la altaro en kiu pli da viktimoj oni oferas. Puraj estas la oferoj kiujn en ĝi oni faras: nenion valoras kaj nenion signifas tiuj, kiujn oni faris al dio Molok kaj al la aztekaj dioj.

Ni do laboru, kaj senĉese sopiru por la granda patrujo. Nur kiam ni ĝin havos en la tuta tero, ĉesos verŝi sangon la altaro de tiu moderna Molok, kaj oni vidos en la homoj, nur membrojn de unu sola familio.

F. PI I MARGALL

Tradukis J. B.



## REVO

**D**UM la kvietaj kaj silentaj horoj de la stelplena nokto, mi turnas mian rigardon kaj penson al la senfina spaco; mi, dronante en ĝia grandega majesteco, lasas erarvagi mian penson por ĝui ĝiajn ĉarmojn. Kaj en mia avido kaj klopodo admiri la belajojn kaj harmonion de l' kreitaĵo mi ekrajdas sur stelvoston kaj ĝi per ĝia kapturniga forkurado min transportas tra novaj mondoj de unu suno al alia suno, de unu nebulozo la alian kaj en la stelcentraĵon. Tie-ĉi mi ekvidas la konstruigon de nova mondo, kiu elnaskiĝinte el ĥaoso pasos tra la diversaj aliformiĝoj ĝis fariĝi, eble, loĝejo de inteligentaj estaĵoj... Pli malproksime, mi rigardas aliajn mondojn enhavantajn riĉoplenan vivon je la plej diversaj formoj; plej malproksime aliaj solidiĝintaj turnos centjarojn post centjaroj tra la spaco, atendante novan *Fiat Lux*... Kiam mi rigardas kaj meditas pri la solidareco reganta en ĉiuj tiuj-ĉi, de lumo kaj vivo plenaj sferoj, plenumantaj la de l' Dio altrudita astrovojo, tiam en tia rava ekstazo, mi memoras pri nia mondo, pri nia tero, pri nia lando, pri nia Katalunlando, kaj ĉefe pri *Esperanto*. Kaj mi pensas ke se la dia verko formis la kreitaron kunigante multe diversajn kaj multenombrajn formojn por fari tian majstroverkon, kia estas la kreitaro, tian harmonian tutajon,



tiel ankaŭ *Esperanto* kunigas la multediversajn rasojn, gentojn, popolojn, homojn; unuvorte: la tutan homaron eltirante el iliaj diversaj malsimilaj lingvoj, tutajon ankaŭ harmonia, kunigantan ilon, entenantan inklignon al plibonigo kaj perfektigo de la homaro: kaj jen kiel ni iras al Dio, al la senfina perfekteco.

J. PRATDESABA



## RAKONTO

**E**N la krisna tempo vivadis Kaja'o nomita Kurono, kiu ĉiumatene, antaŭ ol matenmanĝi disdonis inter la malriĉuloj du mil orajn monerojn. Li estis mortigita en batalo kaj kiel rekompenco al siaj bonfaroj eniris en la paradizon. Tie li trovis orajn montegojn, kaj unu el la gardistoj de tiu ĉiela loĝejo diris al li: «Ĉiuj tiuj-ĉi riĉaĵoj apartenas al vi. La oro kiun vi disdonis helpeme surtere, multigis en la ĉielo.»

Tamen la Raja'o malsatis kaj soifis; li petis ian nutraĵon kaj la gardisto al li diris: «Se kiam vi loĝis en la mondo vi estus regalinte al la soifantoj kaj malsatantoj, kion vi estus doninta, ĉion vi trovus multigita same kiel la oron. Pripensu, ĉu vi faris ian bonon el tiu ĉi speco?»

Post longa pripenso la Raja'o diris: «Mi memoras, ke, ian tagon dum miaj najbaroj disdonis manĝaĵojn al la brakmoj, malsatanta malriĉulo demandis al mi kiu estis la domo kie estis preparita la festeno; mi tiam per la fingro montris ĝin.»

«Pro tia bonfaro — respondis la gardisto — vi ricevos rekompencan. Suĉu la fingron kiu faris tiun signon al mizerulo.»

La Raja'o enmetis la fingron en la buŝon kaj tuje la malsato kaj soifo foriĝis.

Farinte tion ĉi, mallongan tempon li pripensis kaj diris: «Se per la fingro signinte rifuĝon al malfeliĉulo oni recompencas min tiele, kia estos la rekompenco por tiuj kiuj estos sidigintaj ĉe sian tablon la brakmojn?»

La vera helpemo, do, konsistas, ripari per si mem rekte la necesajn de la malriĉuloj.

JOSEP PI

Olot'o.



ENLANDA MOVADO

## BARCELONO

*Festo.* — Por solenigi la fermon de la kurso kiun faris ĉe la «Juventud Católica» pastro Joan B. Sabaté, oni organizis, la pasintan Junion, literatura-muzikan feston.

Kanoniko Dro. Portolés prezidis tiun feston\* je la nomo de la episkopa moŝto Dro. Laguarda kaj en ĝi estis reprezentataj kelkaj societoj kaj grupoj esperantistaj. Sroj. Anglada, González, Solé kaj Torruella reprezentis respektive «Espero Kataluna'n», «Kvinpinta Stelo'n» kaj la Esperantajn Fakojn de la «Academia de Sabadell» kaj de la katolika grupo de Tarragono.

La lernantoj fraŭlinoj Noguer, Lloret kaj Bosch, pastro Lloret kaj doktoroj Ribera kaj Salvá legis per bonega elparolmaniero kelkajn esperantajn verkojn. Sro. Sala Bonfill diris versaĵon verkitan de li mem, kaj Sro. Urbez deklamis alian. Finoj. Farriols kaj Bosch, kaj pastro Sabaté ludis kelkajn muzikajojn kaj Sro. Cerdà legis paroladon de pastro Coll, al kiu same ol al la aliaj partoprenantoj oni multe aplaŭdis.

La festo finiĝis per malmultaj vortoj de Dro. Portolés kaj la esperantista himno. Sro. C. de Ibanza invitis, tuj post la festo, ĉiujn la partoprenantojn al luksa festeneto.

*Konferenco.* — La 18<sup>a</sup> de la pasinta Junio okazis ĉe la «Ateneu La Familiar Obrera» esperantista konferenco organizita de la grupo «Forigu Barojn» de la dirita «Ateneu».

Antaŭ multenombra ĉeestantaro Sro. M. Jordi legis belan verkon tradukitan de franca revuo, per kiu li historiis nian karan lingvon.

Sro. D. Dalmau faris bonan defendon por Esperanto, pruvante ke ĝi estas tre simpla kaj plie ke ĝi malebligas la malamikecon kiu eble estus inter la popoloj se oni elektus iun ajn vivantan lingvon kiel internacian kaj li finis petante ke ĉiuj lernu la internacian lingvon Esperanton.

Tuj post la bela parolado de Sro. Dalmau, la prezidanto de «K. E. F.» Dro. Bremón faris konvinkantan paroladon, dum kiu post kompari la nunajn kaj pasintajn lingvojn kun Esperanto, pruvis la grandegajn profitojn kiuj efektiviĝus se ĉiuj lernus ĝin kaj li klarigas per granda nombro da ekzemploj la utilojn kiujn faros al la homaro nia lingvo Esperanto; lingvo kiu alportos la fratecon al ĉiuj la homoj kaj popoloj de la tero, kaj li finis memorante tiun ĉi frazon de Pi i Margall «ke ĉiuj la homoj bonkoraj kaj bonvolantaj estis devigataj lerni tiun lingvon, ĉar ĝi estos kiu efektiviĝos Pacon kaj Amon inter ĉiuj la popoloj.»

La parolintoj estis tre juste aplaŭdataj kaj Sro. Navarro finigis la kunvenon dirante ke la proksiman semajnon oni malfermus klasojn senpagajn, kiuj okazos lundojn, merkredojn kaj vendredojn, vespere de la 9.<sup>a</sup> ĝis la 10.<sup>a</sup>.

*Festeno.* — La lernantoj de la kurso kiun faris Dro. Bartomeu ĉe la «Colegio de Farmacéuticos» organizis, je lia honoro, festenon kiu okazis la 21<sup>an</sup> de Junio en la restoracio Miramar.

Dum ĝi kaj pro la sukceso kiun atingis la dirita kurso, oni decidis fondi Esperantan Fakon en la «C. de F.». La prezidanto kaj sekretario de tiu nova fako estos eble Droj. Ribalta kaj Bartomeu.

La ĉeestantoj petis de la Direkta Komitato de la «C. de F.» ke la «Colegio» aliĝu al la VI.<sup>a</sup> Internacia Esperantista Kongreso en Washington kaj ilia propono estas jam akceptita.

La «Colegio de Farmacéuticos» de Barcelono, estas, do, eble la sola farmacia societo en Hispanujo, kiu kongresaniĝis al la VI.<sup>a</sup>. Ni gratulas ĝin pro la helpo, kiun ĉiam donas al Esperanto.

*Ekspozicio.* — Dum la monato Junio okazis en la societo «Ateneu Enciclopedic Popular» grava Esperanta Gazetara Ekspozicio.

Prave povas fieriĝi liaj organizintoj, ĉu pro la sukceso, ĉu pro esti ĝi la plej granda okazinta ĝis nun en nia lando; faktoj kiel tiu ĉi honoras Esperanton kaj la Esperantistoj kaj samtempe propagandas nian aferon inter la neesperantistoj. Kiu povas dubi pri la utileco kaj efektivegebleco de Esperanto antaŭ 230 eldonitaj kaj eldonataj ĵurnaloj? Ĉu tio ne pruvas ĝian praktikon, utilecon, kaj antaŭ ĉio ĝian triumfon tra la mondo?

De la malfermo, ĝis la fermo ĝi estis vizitita de la Barcelonaj samideanoj.

Estis ekspoziciitaj tie, de la plej riĉaj, belaj, kaj gravaj gazetoj, ĝis la plej modestaj kaj malgrandaj, diversinkaj presitaj, kaj velografaj; la unua kiu aperis en la mondo, *La Esperantisto* eldonita ĉe Nuremberg, en la 1888<sup>a</sup> jaro, la unua kiu aperis en Ameriko *L'Esperantiste Canedien* ĉe Montreal en 1889<sup>a</sup> jaro, la unua en Hispanujo *La Esperanto* ĉe Santander en 1900<sup>a</sup> jaro, la unua en Katalunujo *Espero de Katalunujo* ĉe Ceret en 1905<sup>a</sup> jaro, kaj ankaŭ la katalunaj gazetoj *Tutmonda Espero*, *Jen*, *Semo* kaj *Kataluna Esperantisto*, kiuj okupis specialan lokon. Oni vidis tie, ankaŭ, la klopodojn de la Esperantistoj el tio malsamaj landoj, kiuj eldonis kaj eldonas ĵurnaloj, batalante ĉiam por la homa interkompreno. Kiom da entuziasmo, fervoro, kaj sindonemeco verkita sur tiom da paĝoj.

Estas ja monumento konstruita al nia kara Esperanto. — LA DELEGITO.

## TARRAGONA

La urba konsilantaro de tiu ĉi urbo en sia lasta kunsido decidis aĉeti Esperantaj lernolibroj por la urba gvardio, ĉar estas necese ke kiam okazos la kongreso de «K. E. A.» en nia urbo la kongresanoj, trovu eĉ la stratŝtonoj esperantigitaj.

Por tiu ĉi okazo nia urbestro ricevis multajn dankojn de niaj samideanoj.

La grupo «Tarragono Esperanta» decidis eldoni gvidlibron de nia estimata urbo. — LA DELEGITO.

## LLEIDA

En tiu ĉi urbo dum la venonta Septembro, oni ekkomencos, Esperantan kurson instruita de la klera instruistino el la Normala Lernejo. Fino. A. Millan Arbiol. Tiu kurso nur estos por virinoj, kiu okazos sendube ĉe la societo «Círculo Comercial».

Tom post iom, oni esperantiĝos tiu ĉi urbo, ĉar mi scias ke kelkaj da junuloj ankaŭ lernas Esperanton ĉe la societo «Centre Republicà Radical» kaj baldaŭ oni starigos aliajn kursojn en aliaj politikaj societoj.

La ĉiutaga ĵurnalo *El Correo de Lérida* publikigis kelkaj propagandaj artikoloj pri Esperanto katalunlingve, subskribitaj sur la nomo *Josefo*.

Mi ankaŭ sciigas al la legantoj ke iaj pastroj lernas nian lingvon private. — LA DELEGITO.

## VIC

*Esperanta karavano al Tove ló'*. — Antaŭ kelkaj semajnoj, societanoj el ĉi tiea societo «Vik'a Esperantistaro» organizis propagandan ekskurson al najbara vilaĝo Torelló, kiun decidis aliĝi ankaŭ kelkaj esperantistoj el Manlleu.

Gajaj kaj decidaj la Vik'anaj batalantoj por nia doktrino eliris el Vik kiel vera karavano konkeranta novajn landojn por nia Esperantujo, kaj kiel vera armeo por celi tiun novan konkerajn rekrutis dum sia preterirado tra Manlleu, la esperantajn soldatojn el ĉi tiu vilaĝo pretajn por kunhelpi tian propagandan fakton jam de longe tiom bezona en Torelló, kie ne estis eĉ unu esperantisto.

Tie, tre ĝentile oni akceptis la ekskursanojn en la loĝejo de la societo «La Barretina», en kies ĉefa salono oni pretigis konferencon de Esperanta propagando.

Post prezento de la esperantistoj farita de la Prezidanto de la Literatura fako el tiu societo, al ĉeestantoj, parolis nia kuraĝa kunulo, la laboristo Basols, kiu inter kelkaj spritaĵoj prezentis ĝeneralajn utilaĵojn de Esperanto por la tutmonda laboristaro.

La entuziasma oficiala instruisto el Vik Sro. Navés prezentis kaj pruvis la nepran bezonon de internacia lingvo post la nacia sed ke tiu lingvo ne devas esti unu el la nunaj naciaj lingvoj sed tute internacia kaj tial artefarita.

Sro. Coll, nelaciĝa batalanto, tre interese klarigis la naskiĝon kaj la diversajn disvolviĝojn de Esperanto dum ĝia trairado tra la mondo.

La tutezorgema Sro. Albagés, oficiala instruisto el Vik, klarigis sur nigra tabulo la ĉefajn regulojn de la Zamenhofa lingvo, por montri al ĉeestantoj ĝian facilecon kaj logikecon neatingeblajn de aliaj lingvoj.

Kaj fine la Prezidanto de la ĉi tiea societo Sro. Palmarola rimarkigis la amon kaj fratecon kiun oni sentas ĉe la tuta esperantistaro, eĉ ĉe personoj el malsama opinio aŭ religio, ĉar Esperanto havas nur unu devizon: *Amo por la Homaro*.

Ĉiuj parolintoj estis tutkore gratulataj de la aŭdintaro, kaj mi esperas ke tiu paca karavano havos baldaŭ la ĝojon esti konkeranta por Esperanto alian vilaĝon el pia Katalunlando, ĉar ilia semado estas disjetita sur fruktigan kaj akcepteman teron. — Vik, Julio 1910. — KROM.

## REUS

Esperanto daŭrigas fervore, kaj ĉiam antaŭe en nia urbo.

La 10<sup>a</sup> de Julio, ni faris ekskurson al Riudecanyes kaj Argentera. Kiam ni estis vizitinte la grandaĝvejo de Riudecanyes, ni piediris ĝis la antikvan vilaĝon Argentera, kie ni manpremis kun la saĝa kaj inda kunbatalanto Sro. Jozefo Pamies, paroĥestro. Li invitis nin al sia domo, en kiu oni rakontis al ni sian ekskurson al Parizo por ĉeesti al la «Unua Katolika Esperanta Kongreso».

En nia urbo oni eldonas literaturan duonmonatan gazeton sub la nomo *Foc nou*, kaj liaj eldonistoj petis de ni nian kunhelpon por disvastigi nian amatan idealon, kaj ni akceptis korege. — LA DELEGITO.

## MANLLEU

Ankaŭ la loĝantoj el Manlleu ne volas resti la lastaj en nia batalado. Dum la monato Julio, oni malfermis du Esperantajn kursojn: unu ĉe la societo «Centre Aucellaire», donita de nia amiko Sro. B. Noguer; kaj la alia de sinjoro J. Grivé, tiu tre lerta esperantisto, kiu jam en la lasta monato finis kurson donita al dekdek junuloj. Nun li instruas al dekdu fraŭlinoj, kiuj scivolemaj kaj entuziasmaj ne sin laciĝas. Kvankam ili estu mokitaj de siaj kamaradinoj.

Kelkaj el ni ĉeestis al la ekskurso al Torelló, kie okazis grandan propagandon per nia ideo. — LA DELEGITO.

## SABADELL

Ĉu pro la varmeco, ĉu pro aliaj aferoj, ŝajnas ke la Esperanta movado en tiu ĉi urbo restas iom haltigita, ĉar de kelkaj semajnoj, nenian, mi povis raporti pri nia afero, krom la novaĵo ke baldaŭ estos starigita «Katolika Esperanta Societo».

Se estas vera la novaĵo, estos pruvo ke nia movado jam atingas tiom da sukceso, ke ĝi permesas krei specialajn societojn esperantistajn eĉ en la urboj kiuj ne havas grandajn popolamasojn.

La grava societo «Centre de Dependents del Comerç i l'Industria» ricevis esperantan leteron el Bukareŝt (Rumania) petante al ĝi kelkajn notojn kaj klarigojn pri la labora organizado en nia lando. — LA DELEGITO.

## GIRONA

«Geronprovinca Esperanta Kongreso». *Cirkulero* 3.<sup>a</sup>. — Tiu ĉi Organiza Komitato havas la honoron sendi al vi, por ilia elstudado, la ĝis nunajn prezentit-

ajn proponojn, kaj ankaŭ al vi komuniki ke la tempo por prezenti proponojn daŭros ĝis la 15 de tiu-ĉi monato.

Pri la propono 17, ĉiu aliĝinta Grupo povas — kaj ĝi estas tre petata ĝin fari — redakti regularon: la al ni senditaj regularoj estos pridiskutataj de la Kongresanaro aŭ de la Komitato kiu estos elektita por tiu celo. — Geronon, Julion 1910<sup>a</sup>. — LA O. K.

*Propoj por diskuti ĉe la Kongreseto:* — 1.<sup>a</sup> Estos tre necese, por la bona propagando kaj disvastigado de lingvo «Esperanto», ke la societoj kaj grupoj de Ĝerona provinco kreos «Provinca'n Federacio'n». (Proponinto: Sro. Lusilla.)

2.<sup>a</sup> La Provinca Federacio (se ĝi efektiviĝos) penos por ke en ĉiu Hispana provinco ankaŭ oni kreu Federacion same kiel en Ĝeronprovinco; ke Federacio de sama regiono formos Regionan Federacion, kaj ke la Regionaj Federacioj elektos Nacian Komitaton kiu havos sur sin la reprezentadon de Hispana Esperantistaro por ĉio, kio estu internaciaj Esperantaj aferoj, kaj por sin turni, kiam tion bezonos, al la estraroj ĉu urbaj, ĉu regionaj, ĉu naciaj. (Proponinto: Sro. Lusilla.)

3.<sup>a</sup> Se efektiviĝos la Federacio, ĉu estus konvena aliĝi al la «Kataluna Esperantista Federacio» por propagandi la ideon de la 2.<sup>a</sup> propono? («Kataluna Esperantista Federacio» povus esti la «Kataluna Regiona Federacio», laŭ la organizo citita ĉe la 2.<sup>a</sup> propono.) (Proponinto: Sro. Lusilla.)

4.<sup>a</sup> Ĉu estos eble ke la Grupoj de Ĝerona provinco helpos tiun grupon, kiu petos helpadon al ĝia urbestro? (Proponinto: «Amo kaj Espero», de Palafrugell.)

5.<sup>a</sup> Ĉu estos eble fondi Gazeton organo de la «Grupoj de Ĝerona provinco»? (Proponinto: «Amo kaj Espero», de Palafrugell.)

6.<sup>a</sup> Kredante ke la Kongreseto celas krei «Federacion», ĉu estos konvena ke tia Federacio aliĝus, kiel Esperanta Asocio, al «Universala Esperanto-Asocio» por uzi la servojn de tiu-ĉi Asocio? (Proponinto: Sro. Amik.)

Ni varme deziras ke la penadoj de niaj Ĝerona samideanoj fruktedonos, kaj fervore ni petas al niaj tieaj aliĝintoj ke ili alestu ĉiuj en la Kongreseto por partopreni en la pridiskutado de tiuj temoj, celante varbi la nealiĝintojn al nia «K. E. F.» Ne forpelu nek forlasu la okazon, amikoj, kaj kunhelpu la sukceson de la Kongreseto! — «K. E.»

Inutil dir que la «Federació Catalana d'Esperantistes» hi enviarà representació, i que directa i indirectament hi prendrà part. Sens perjudici de lo que ls nostres delegats puguin exposar, ens creyem en el dever de fer alguns comentaris a les proposicions presentades a discussió, amb el bon intent de contribuir a que tinguin efectivitat immediata i pràctica.

I mereixen predilectament nostra atenció les proposicions 3.<sup>a</sup> i 5.<sup>a</sup>, car amb elles va intimament lligat el fi que's proposa la «K. E. F.»

En primer lloc, (cal que ho remarquem) la «Federació Catalana» no es

incompatible amb la creació i existència de Federacions comarcals, ni provincials, ni de ciutats; ans al contrari: com més agrupats els esperantistes estiguin, millor i més prompte triomfarem, més forsa compacta i més poixança. Però s'ha de tenir molt compte en no crear noves institucions sinó quan les necessitats de circumstància i medi hi obliguin, mai quan no obeeixin an aquesta necessitat, car foren prematures i difícilment viurien: seria pujar la casa per la teulada.

Fem els fonaments primer, i sobre tot afermem i enrobustim bé les institucions existents; car l'afany o'l prejudici de crear noves institucions que no responguessin a les necessitats per les quals fossin creades enfeblirien necessàriament les existents i contribuirien ineludiblement a la llur mort. No vull dir que 'ls gironins no tinguin dret ni estiguin encertats en crear la «Provincia Federacio». Ells, més que nosaltres, coneixen el llur estat, i deuen saber si aquesta es menester. I molt menys negarem que hi tinguin dret; ans al contrari: el fet de que vulguin crear la tal Federació afirma implícitament el dret d'existència de la nostra, i, com he dit abans, la nostra no es incompatible amb cap Federació parcial o universal.

Altrament, si 'l Congrés de gironins acorda la fundació de la seva Federació, opinem que de fet se fan solidaris de la nostra, i conseqüentment han d'aderir-s'hi. Ells, com nosaltres, se proposen (aixís se desprèn de les adjunctes proposicions i de la *Regularo* remès apart) fer Esperanto, amb la diferència que ells concreten llur camp d'acció a Girona, mentres que «K. E. F.» l'extén a Catalunya. Fóra, doncs, d'esperit mesquí, raquític, isolar-se: millor, opinem que tal isolament seria suïcida. Per què? Aduim totes les raons que's puguin aduir per a demostrar que ha de crear-se la Federació de la província de Girona. I pareu ment: si algú atribueix a «K. E. F.», o als seus directors, propòsits amagats, igualment poden atribuir-se (sens cap mena de fonament, es clar) a qualsevol entitat o agrupació, si es que's creu que hi ha despreocupats capaços de fer tort al reglament pel qual se regeixen. Està en l'ànim i en els propòsits de «K. E. F.» excitar la creació de Federacions consemblants. Millor que's fundin per propria iniciativa, car aixís se demostra que hi ha vida esperantista. I no està concretada aquí encara la nostra acció, sinó que anem molt més enllà: aspirem a iniciar, o a contribuir al menys, a la creació de la Federació Mundial. Avui es una utopia encara, car hi manquen els fonaments. Per això nosaltres treballem els de nostra terra, per a arribar-hi; i 'ns plau, particularment, que no siguem sols a encaminar-nos-hi.

Prop. 5.<sup>a</sup> — Veus-aquí 'l gran anhel de tot grupo: publicar un periodic! Convinc amb un amic, qui fa pocs dies que a *Tutmonda Espero*, anteriorment un altre a *Jen*, se planyien de massa periodics! Amics! Es una preocupació la creença que molts periòdics signifiquin revelació de vida! No i mil voltes no! Jo us convido a que reflexioneu un moment, i considereu quant més valdria, per exemple, que's tres periòdics que a Catalunya 's publiquen ne componguessin un no més: el preu de cost fóra 'l mateix que'l nostre, amb l'avantatge de poder ser esplendí i curull d'informació i de text!

Actualment (i això no es cap acusació per a ningú) cap dels nostres pot

comparar-se, per exemple, al *British*, a la *Germana*, etc.! I pensar que podriem assemblar-nos-hi!

Nosaltres ho declarem sincerament: un nou periodic traurà, avui per avui, vida i concurs als existents, i no responderà a cap necessitat ineludible. I creiem que tal procedir fóra suïcida. Si vosaltres, correligionaris de Girona, opineu convenient tal medi de comunicació, us proposem que envieu petició al Concell de «K. E. F.» sollicitant una part del portaveu KATALUNA ESPERANTISTO per a la vostra secció oficial. Desde ara va nostre apoi a vosaltres. Sobre tot, uniu i tendiu a unir: no disgregueu. — LA REDACCIÓ.



### «INTERNACIA ASOCIO DE INSTRUISTOJ»

Por respondi al multaj demandoj kaj deziroj, la Prezidanto de «I. A. I.» informas ke la 1<sup>ma</sup> de aprilo Sro. Čejka skribis ke la tria kajero de *Internacia Pedagogia Revuo* estas kompostata. Oni do povas esperi baldaŭn ricevon kaj kontentojn. «I. A. I.» anoj vizitontaj la Ekspozicion en Brukselo estas petataj elekti la 1<sup>ma</sup> de septembro. Tiun tagon ili povos renkonti komitatanojn, almenaŭ la Prezidanton kaj la Sekretarion ĉe la gasta tablo de *Le Moulin d'Or*, 30, strato d'Assaut, apud la preĝejo Ste. Gudule. Oni memoru kaj dessciĝu.

JOSEP ALBAGÉS  
konstanta korespondanto

*La Escuela Moderna* profesia revuo el Madrid, ekkomencis publikigi esperantan paĝon, Protektu ĝin, karaj samideanoj instruistoj.—J. A.



### KORESPONDADO

Sro. A. T. Vi ĝin vidos en venonta numero. — A. B. Via verko aperos en unua venonta numero. — G. C. (Igualada). Ni ricevis vian unuan kaj duan tradukaĵojn.—«Pri Balmes». Bedaŭrinde vi ne esperantigis ĝin fidele, kaj ĝia korektado ŝajnos nova traduko: ni ne havas tempon por ĝin verki novan fojon. — S. P. Korajn dankojn. En la venonta numero ĝi aperos. — J. P. Ankaŭ vi vidos ĝin baldaŭ enpresigita. — Sro. Vicente Albamonte. Ricevita vian verketon, Ni ĝin legos. — A. M. Same kiel la antaŭa.